ESPERANTISTA POLSKI


La

TAGIGO

KANTO ESPERANTISTA

POR ESPERANTISTO

ORIGINALE VERKIS ANTONI GRABOWSKI.




Eldono de JAN GÜNTHER.

La Tagiĝo.

KANTO ESPERANTISTA.

Poezio de *Antoni Grabowski.* Muziko de *Barański.*



BIBLIOTEKA
Warszawskiego
Tow. Muzycz.
Nr. II-30.089

A-31.800/80

Agordu la brustojn, ho nia fratar',
Por nova, pli vigla jam kanto;
Ĝi sonu potence de montoj al mar',
Anoncu al ĉiu dormanto:
Tagiĝo, tagiĝo radias en rond',
La ombroj de nokto forkuras el mond'.

Post longa migrado sur dorna la voj',
Minacis nin ondoj de l' maro,
Sed venkis ni ilin kaj velas kun ĝoj'
Al verda haven' de l' homaro.
Post longa batalo, maldolĉa turment'
La stela standardo jam flirtas en vent'.

Se venus ankoraŭ ventegoj, batal',
Ni estas jam bone harditaj,
Esperon ne venkos la fajro, nek ŝtal',
Nek ies perfidoj subitaj.
Nenio en mondo elŝiros ĝin for,
Ĝi havas radikojn profunde en kor'.

Ni velas antaŭen kun kredo, fervor',
Benante la Majstron por verko,
Kaj lian anaron, de plej frua hor',
Fidelan al li, ĝis la ĉerko.
La mond' aliiĝos, la temp' pasos for,
Sed vivos eterne pri ili memor'.

La lingvo benata montriĝis al ni
Mirinda donaco ĉiela:
Per amo al hejmo, patrujo, naci',
Ni flamas en koro fidela,
Kaj same fidelaj al hejma altar'
Ni sentas nin filoj de l' tuta homar'.

En ĉiu mond-parto, en ĉiu ter-zon,
En koroj de centoj da miloj,
Jam vibras por nia saluto reson',
Do kantas de l' tero ni filoj:
Tagiĝo, tagiĝo radias en rond',
La ombroj de nokto forkuras el mond'.

Originale verkis **Antoni Grabowski.**

Mus. II-30.089

Prezo 𝑆 0.10

Ricevebla ĉe Adm. de „Pola Esper". Varsovio (Polujo) Hoża 20.

Al ĉiuj esperantaj gazetoj, societoj kaj grupoj oni sendas po 2 ekz. senpage.

ESPERANTISTA POLSKI

La TAGIĜO

KANTO ESPERANTISTA

POR ESPERANTISTOJ

ORIGINALE VERKIS ANTONI GRABOWSKI.



Eldono de JAN GÛNTHER.